# *Kongreso de la asocio de amikeco Italio-Kubo.*

Parmo, Italio, 10 mar (RHK) Kun partopreno de 120 delegitoj en reprezento de ?irka? 3 mil 500 membroj organizitaj en 68 rondoj tra la tuta e?ropa lando, sesias en tiu ?i urbo la 12-a kongreso de la Nacia Asocio de Amikeco Italio-Kubo.

Dum tri tagoj la ?eestantoj revuas la laboron faritan dum la lastaj kvar jaroj, dividas spertojn kaj bonajn praktikojn por plibonigi la funkciadon de la organizo,  kaj elektos novan estraron.

Kuba delegitaro anka? partoprenas la renkonti?on, gvidata de la unua vicprezidanto de la Kuba Instituto de Amikeco al la Popoloj (ICAP), Elio Gámez. La kongreso sesias en la hotelo CDH Parma & Congressi.

La? deklaroj al la informagentejo Prensa Latina, la vicprezidanto de la itala organizo kaj sekretario de ties rondo en Romo, Marco Papacci, emfazis la gravecon de la kongreso kiel fekunda spaco de ideoj kaj novaj celoj, subtene al la kuba revolucio, fronte al la pliforti?o de agresemo flanke de la usona registaro.

Fonto: PL

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/157130-kongreso-de-la-asocio-de-amikeco-italio-kubo

**Radio Habana Cuba**